# Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (lll) de la Generala Asembleo. 10a" de decembro 1948

Antaūkonsideroj

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de čiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero. justo kaj paco en la mondo,

Pro tio. ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro. kaj ke la efektivigo de tia mondo. en kiu la homoj guos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberigon el timo kaj bezono. estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj,

Pro tio. ke nepre necesas. se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo. ribeli kontraù tiranismo kaj subpremo, ke Ia homaj rajtoj estu protektataj de la lego,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuigintaj Nacioj en la Čarto reasertis sian ñrman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj tîrme decidis antaūenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Statoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuigintaj Nacioj, la antaūenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj

kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj či rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, nun,

La Generala Asembleo,

Proklamas tiun ôi Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kiel komunan celon

de atingo por čiuj popoloj kaj čiuj nacioj, por tio, ke cˆ:iu individuo kaj Čiu organo de